

# Jambo! Karibu! Hakuna Matata

**109-A UNIVERSALA  
KONGRESO DE  
ESPERANTO**  
ARUŠO, TANZANIO, 3-10 AŬGUSTO 2024


**TANZANIA**  
*Unforgettable!*

**TEA**  
TANZANIA ESPERANTO ASSOCIATION

**TANZANIA NATIONAL PARKS**

**UEA**  
UNIVERSAL ESPERANTO ASSOCIATION

**TANZANIA**  
THE ROYAL TOUR



# Raporto pri 109-a UK en Arusha Tanzanio

Historia Kongreso – la unuan fojon UK en Afriko 854 aliĝintoj

La UK tutmondiĝis. UEA subtenis finance la partoprenon de Afrikaj Esperantistoj, kvankam por aliaj la partopreno fariĝis multekosta ĉefe pro la altaj vojaĝkostoj tamen bona nombro de aliĝintoj el aliaj kontinentoj sukcesis ĉeesti.

Plimulto de la kongresanoj alvenis el Afriko kaj Azio (i.a. granda delegacio el Ĉinio) kaj plejmulte gejunuloj, kiuj bone parolis la lingvon.

La Komitato de UEA aprobis kaj akceptis la Strategian Laborplanon

Kongreso de plej bona etoso – Kongreso de kuna ĝojo, rido, muziko kaj danco.

Sukcesa organizado – elstara laboro de la LKK kaj nombraj volontuloj kaj la Kongresa Fako

Sennombraj ekzotikaj turismaj kaj kulturaj travivaĵoj

Kun ĝojo la partoprenantoj konstatas, ke tiu unua Universala Kongreso en Afriko plene sukcesis. Ĝi pruvis, ke en Afriko la movado por neŭtrala internacia lingvo, nome Esperanto, estas vigla; ke ĝi aktivas en multaj landoj de la afrika kontinento; kaj ke la afrikaj esperantistoj liveras valoran kontribuon al la universaleco de la tutmonda Esperanto-movado. Kun sama ĝojo la partoprenantoj observas, ke multaj junaj homoj en afrikaj landoj lernas Esperanton en kursoj kaj ke en multaj afrikaj landoj estas planite organizi pli da kursoj por ebligi al pli da homoj personajn internaciajn kontaktojn per Esperanto.

**El la Rezolucio de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto,  
Aruŝo, Tanzanio**





# TEMOJ

1. STRATEGIA LABORPLANO KIRI ( aŭ pli ĝuste? IRIK )

KUNLABORADO – INFORMADO - RILATOJ EKSTERAJ - INSTRUADO  
(kun aldonoj de artikoloj de Duncan Charters kaj Renato Corsetti )

2. BUDAPEŝTA SKOLO – PRELEGO dum KLERIGA LUNDO kun TRIBUTO al ISTVÁN SZERDAHELYI kaj SOLENA ALVOKO por ARTTRADUKI NACILINGVEN POEMON *AŬTUNA FOLIARO* de Paĉjo JULIO BAGHY

3. PACO                   - SABIN MARUHE, POETO de PACO  
                              - SOLENA ALVOKO de Preleganto pri PACO

4. BILDOJ kaj FILMETOJ pri la 109-a UK

5. LITERATURA ALDONO: Centvortaĵo Akuzativo -Tempovojaĝo

6. Preleganto publike pardonpetas – Propono por la Rezolucio de la UK far S-no Ian Fantom

**La Voĉo de Kilimanĝaro**, ĵurnalo de UK-2024 <https://uea.org/teko/kurieroj?jaro=2024>

**La Ondo de Esperanto** : Jukka Pietiläinen Unika okazaĵo en Aruŝo

[https://sezonoj.ru/2024/08/afriko-47/?fbclid=IwY2xjawFBP8ZleHRuA2FibQIxMQABHejn1m7ILgymHHUXo75Qfg\\_qS\\_nVufu6Fe98R4kTshsLauTXy8FwrKYIEw\\_aem\\_xQ-OwKvgSMPODFT3oYNqKw#more-23913](https://sezonoj.ru/2024/08/afriko-47/?fbclid=IwY2xjawFBP8ZleHRuA2FibQIxMQABHejn1m7ILgymHHUXo75Qfg_qS_nVufu6Fe98R4kTshsLauTXy8FwrKYIEw_aem_xQ-OwKvgSMPODFT3oYNqKw#more-23913)

**Libera Folio** publikigis kvin artikolojn, la plej gravaj atingebblas ĉi tie:

**En Aruŝo venkis idealismo, artikolo de Tim Owen**

[https://www.liberafolio.org/2024/08/15/en-aruso-venkis-idealismo/?](https://www.liberafolio.org/2024/08/15/en-aruso-venkis-idealismo/?fbclid=IwY2xjawFBIf5leHRuA2FibQIxMQABHX6GbNcAsLHskOwtIBu0QDPc4fD_W7sTxH706fuBh2ZW8pPGBNxRJKrZ0A_aem_Q7jDkNkoDu5gWb60IaNCTQ)

[fbclid=IwY2xjawFBIf5leHRuA2FibQIxMQABHX6GbNcAsLHskOwtIBu0QDPc4fD\\_W7sTxH706fuBh2ZW8pPGBNxRJKrZ0A\\_aem\\_Q7jDkNkoDu5gWb60IaNCTQ](https://www.liberafolio.org/2024/08/15/en-aruso-venkis-idealismo/?fbclid=IwY2xjawFBIf5leHRuA2FibQIxMQABHX6GbNcAsLHskOwtIBu0QDPc4fD_W7sTxH706fuBh2ZW8pPGBNxRJKrZ0A_aem_Q7jDkNkoDu5gWb60IaNCTQ)

**UEA funkcios per volontuloj kaj laborgrupoj laŭ raportoj de Jukka Pietiläinen kaj Tim Owen**

[https://www.liberafolio.org/2024/08/10/uea-funcios-per-volontuloj-kaj-laborgrupoj/?](https://www.liberafolio.org/2024/08/10/uea-funcios-per-volontuloj-kaj-laborgrupoj/?fbclid=IwY2xjawFBla1leHRuA2FibQIxMAABHQU_y8t2JK2z-DxR3JHHXXV5oh42IMZV_2NqFC36QAODI5gWt34VHdbeKA_aem_xBd3wB3XdXyJTjfJI6Ijig)

[fbclid=IwY2xjawFBla1leHRuA2FibQIxMAABHQU\\_y8t2JK2z-](https://www.liberafolio.org/2024/08/10/uea-funcios-per-volontuloj-kaj-laborgrupoj/?fbclid=IwY2xjawFBla1leHRuA2FibQIxMAABHQU_y8t2JK2z-DxR3JHHXXV5oh42IMZV_2NqFC36QAODI5gWt34VHdbeKA_aem_xBd3wB3XdXyJTjfJI6Ijig)

[DxR3JHHXXV5oh42IMZV\\_2NqFC36QAODI5gWt34VHdbeKA\\_aem\\_xBd3wB3XdXyJTjfJI6Ijig](https://www.liberafolio.org/2024/08/10/uea-funcios-per-volontuloj-kaj-laborgrupoj/?fbclid=IwY2xjawFBla1leHRuA2FibQIxMAABHQU_y8t2JK2z-DxR3JHHXXV5oh42IMZV_2NqFC36QAODI5gWt34VHdbeKA_aem_xBd3wB3XdXyJTjfJI6Ijig)

## **Rekomendoj al la Komitato de la Komitataj Forumoj**

En la Komitataj Forumoj pri strategia laborplanado, estis aprobita la jena baza propono:

1. Starigi laborgrupojn por efektivigo de specifaj planoj, limigitaj (Samarkando 2025 por la Unesko-konferenco), kaj longdaŭraj (internacia eksperimento por nekontesteble demonstri la valoron de Esperanto kiel lernfaciliga lingvo por posta lingvolernado kaj instrumento por evoluigi interkompreniĝon inter diversaj popoloj).

2. La modelo povus esti tiu proponita kaj aprobita pri informado, ke estu unu ĉefa laborgrupo sub nia dungita kunordiganto (Lu Wunsch-Rolshoven), taskita pri prioritatigo de celoj, trovo de tre kvalifikita kaj fidinda respondeculo pri gvidado de ĉiu projekto. Interesitoj laŭ la enketilo de UEA estus kontaktitaj, kaj anonco farebla en niaj organoj pri la specifa bezono.





# KUNLABORADO

## Resume:

- Por faciligi internan kunlaboradon necesas la modernigita retejo (AKSO) por aŭtomatigi servojn
- La trijara Almanako kiu donu bazajn informojn pri la agado kaj agadgrupoj de la Esperanto-movado
- Necesas helpo por kunlaborigi asociojn harmonie, do ni konsideru ombudsmanon aŭ mediaciadon (TEJO havu rimedojn por konfliktsolvado), kaj trejnado de individuoj kapablaj en tiu kampo.
- Laborgrupo helpu al Landaj Asocioj kaj kuraĝigu interasocian agadon, Landaj Asocioj estu pli efikaj per kunlaborado kun aliaj
- Plene ekspluatu zoom kaj aliajn videokonferencajn sistemojn.
- Ni komencu trovi la necesajn gvidantojn kaj laborantojn por la diversaj laborgrupoj, identigante individuojn kiuj pretas helpi. Ni fondu laborgrupon por esplori ĉu necesas restrukturigi la organizadon de UEA por ke estu pli da opcioj ol agado laŭ Landaj Asocioj.

# INFORMADO

## Resume:

- La komitata forumo pri informado aŭskultinte la komisiiton pri komunikado de UEA proponas kiel unuan paŝon formi labor-grupon/komisionon pri informado sub la respondeco de la estrarano pri informado, en kiu estu ĉiuj reprezentantoj de la formotaj subgrupoj pri informado [oni menciis la subgrupojn pri esperanto.net, sociaj komunikiloj, pri landaj informaj fakoj kaj aliaj subgrupoj laŭ la aperontaj bezonoj].

## Kelkaj ŝlosilaj vortoj:

Interna informado estas plibonigenda. Necesas utiligi diversajn kanalojn por diversaj celoj. Pri tiuj retejoj, necesas distingi la teknikajn bezonojn kaj la provizadon de enhavo. Pri la enhavo: ne mankas argumentoj por Esperanto, sed mankas homfortoj por disvastigi ilin. Necesas instrui kiel reagi al artikolo kritikanta Esperanton.

## Laborgupo povos helpi kunordigi la tuton, difinante:

- Klaran tabelon de “kiu faras kion?”, por pli bone konscii, ĉu mankas homfortoj por esencaj taskoj
- Strategion pri kolektado de informoj por la retejoj kaj la sociaj retoj
- Partoprenon en eventoj, kie utilas prezenti Esperanton, kaj kreadon de tiucela materialo

# EKSTERAJ RILATOJ

## Resume

- Daŭre subtenu la agadon de niaj reprezentantoj ĉe internaciaj organizaĵoj (specife sed ne sole UN kaj Unesko).
- Fokusiĝu pri specifaj projektoj, kiel la konferenco de Unesko en Samarkando en 2025.
- Identigu kiel la Esperanto-movado povos doni servojn al ĉiam pli da internaciaj organizaĵoj
- (laborgrupo) Utiligu pli ampleksan aliron al pli diversaj komunikiloj, inkluzive retejojn, por informi pri niaj servoj.

### El la detaloj:

- Preparo de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Samarkando kaj de la rezoluci-propono
- Kontakto kun la landaj komisionoj de Unesko kaj plenigo de la landaj proceduroj por ricevi apogon
- Pristudo de la proceduroj por interalie partopreno en la komisiono pri virinoj en Ĝenevo kaj konstanta reprezentigo en la UN-sidejo en Najrobio

### Pliaj celoj en Unesko estas apogo al

- Esperanto kultura heredaĵo de la homaro
- UEA fariĝu organizo en asociaj rilatoj kun Unesko, kaj ne nur konsultaj rilatoj

# INSTRUADO

## Resume:

- Konstanta kunlaborado kun ILEI por plenumi la laborplanojn de ambaŭ asocioj.
- Daŭra kunlaborado kun edukado.net subteno al la KER-ekzamenoj.
- Longdaŭra laborgrupo por organizi internacian eksperimenton pri la valoro de Esperanto kiel lernfaciligilo por lingvoj, kaj instrumento por kreskigo de interkultura kompetento.
- Kunlaborado kun projektoj de ILEI kaj projektoj de aliaj asocioj, kiel 30 Oraj Horoj en Italujo, kiun oni ellaboros por etendi al aliaj landoj se pro la rezultoj eblos peti kaj ricevi aliajn stipendiojn.
- Subteno de instruado je universitata nivelo – pli da kunlaborado inter izolitaj universitatanoj kaj esploristoj, plia utiligo de la Amsterdama Katedro tiucele, trovo laŭeble de programo iel anstataŭonta la finiĝantan programon en Poznano, daŭra subteno de nia apero en konferencoj, kaj virtualaj seminarioj kaj simpozioj kiel tiuj organizitaj de CED kaj la Novjorka oficejo de UN.. Ekzemplo: en la internacia konferenco pri lingvistiko okazonta en Poznano en septembro ĉi-jare, okazos ne nur 12 prezentaĵoj pri interlingvistiko, sed aliaj prezentaĵoj de esperantistaj esploristoj en aliaj sekcioj de la konferenco, ekzemple sociologio.

Miaj vidpunktoj rilate al la Strategia Laborplano (ankaŭ post konsultado kun kelkaj membroj de HEA) :

Unue, la baza formo de la kunlaboro en la Komitato estas kaj restas la senperaj, rektaj rilatoj, kontaktoj inter la komitatanoj, kiuj maloftas nun,

Due, tio veras inter la Estraranoj kaj komitatanoj,

Trie, la plej gravaj rolantoj de la Movado estas la movadanoj sur la tereno, 'kamparo' , kies voĉojn oni devas ekaŭdi kaj aŭskulti kaj provizi ilin per municio.

Kvare, ankoraŭ ĉiam ĵetas malbonan ombron kiom malmulte da Esperantistoj en Eŭropo uzis la ŝancon montriĝi en la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo,

Kvine, mankas arto-, literaturo- ( alivorte kultura ) strategio. 'K' por Kulturo = KIRIK. Ni ne artradukas sufiĉe da originalaĵoj nacilingven.

La ideo de kunlaboro estas bonega sed ne multo (alia) estas dirita kiel konstrui Esperantujon, kaj

Fine. en la ĉapitro pri UNESKO mankas la priatentigo pri la ĉ. dekdu mil lernejoj tutmonde 'ligitaj' al UNESKO kaj rilataj eblecoj kiel unu horo en lernejoj pri Esperanto.

## Kleriga Lundo: Budapeŝta Skolo – revuo Literatura Mondo kaj Eldonejo LM


*Literatura Mondo* (1922-1949) estis monata literatura revuo kaj libroeldonejo, kaj ĝiaj du eminentaj kreintoj kaj redaktistoj, d-ro Kálmán Kalocsay kaj Gyula Baghy kune kun la kreiva grupo organiziĝinta ĉirkaŭ ili, gajnis la karakterizan kaj prestiĝan nomon de la *Budapeŝta Skolo* en la historio de la hungara kaj Esperantlingva literaturoj. Elstariĝas kvar pliaj membroj de la grupo: Lajos Tárkony (Totsche), Ferenc Szilágyi, Imre Baranyai (Emba) kaj Károly Bodó. La eldonejon Literatura Mondo estris Vilmos Bleier (1931-1938).

"La *Budapeŝta Skolo* profunde influis la poezian teknikon, kiun por la unua fojo ĝi kodigis: la poezia verkado perdis ĉian diletantecan trajton. La nivelo atingita de hungaraj aŭtoroj instigis kaj faciligis ĉiulande tiun evoluon. Rimarkindaj estas la lingvaj eseoj kaj studoj, kiuj fontas de la *Budapeŝta Skolo* kaj ties influo je la tradukarto: ekde 1925, sur la poezia kampo multiĝis elstare bonaj tradukaĵoj."- skribas *Esperanto en Perspektivo* aldoninte ankaŭ la sekvontajn "la lingva revolucio de la *Budapeŝta Skolo* efikis ankaŭ en la prozo. Oni evoluigis stilon elegantan, sed personan, dank' al la malsamaj stilgamoj, pri kiuj oni disponis. Oni evitis pezajn kunmetaĵojn, tro longajn esprimojn... En la tiama Hungario aperis aliaj verkistoj, kiuj tamen aktivis nur sur traduka kampo, sed malgraŭ tio profunde influis la starigon de la prozostilo efika kaj gamkompleta ..."

Retejo <https://esperantohea.hu/la-budapesta-skolo/>

Mihály Babits ( Mihaj Babiĉ ) (1883-1941)

Laŭ li, la tradukado de fikcio en Esperanton gravas ĉar ĝi kreas "la unuecon de animoj". Li estis kuraĝigita de tio, ke ĉefverkoj de la monda literaturo kaj eĉ naciaj antologioj estis publikigataj unu post la alia en la internacia lingvo. "La lingvo ne estas indiferenta vesto, sed la korpo de penso, kaj la animo ne povas resti la sama en la diversaj transmigradoj de la animo. Sed iam ĉiuj nacioj povos legi la saman "Eŭropan literaturon" en la sama lingvo! ... Komuna trezorejo: komuna trezoro, komuna animo. Unueco de animoj."





**En Aruŝo sabaton, la 10-an de aŭgusto 2024 en la Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto *La Voĉo de Kilimanĝaro* ( numero 7 ) aperis**

**Alvoko por traduki la poemon *Aŭtuna foliario* de Julio Baghy nacilingven:**

**Grandan parton de sia sukceso dankas Esperanto al la regulo 16. Almenaŭ tiel opiniis Istvan Szabolcs en sia prelego pri Budapeŝta Skolo – Literatura Mondo farita dum Kleriga Lundo.**

**Zamenhof genie ekkonjektis la rolon kaj signifon de poezio, pri kio jam la fama hungara poeto Sándor Petőfi afiŝis ke tio estas la plej alta nivelo de alparolo al samlingvana komunumo. Poetoj malfermas tavolojn kaj de la animo kaj de la menso. Verkado de gigantoj de Budapeŝta Skolo kiel Kolomano Kalocsay kaj Paĉjo Julio Baghy starigis Esperanton sur egalan nivelon al aliaj lingvoj ankaŭ en poezio.**

**Chanson d'automne (aŭtuna kanto) de Paul Verlaine en sia ĝenro unu el la plej belaj poemoj de mondliteraturo artraduke haveblas en multaj lingvoj.**

**Aŭtuna foliaro, poemo de Julio Baghy neniel postrestas al ĝi. Istvan Szabolcs deklamis ankaŭ ties hungaran tradukon, faritan de li kaj parolis pri tio kiel efike povis jam uzi tion en la movada laboro inter deputitoj de Hungario en la Eŭropa parlamento kaj aliaj gravuloj.**

**La preleganto do turnis sin al la Esperantistaro al ŝatantoj de poezio kun alvoko por artraduki ĉi tiun poemon nacilingven, ju pli da lingvoj des pli bone. La ĉeestanta publiko konsentante akceptis la alvokon.**

Aruŝo

sabaton, la 10-an de aŭgusto 2024

numero 7

**La Voĉo de Kllmanĝaro** 



Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto

## Baghy Gyula : Aŭtuna foliaro    Őszi falevelek

Foliaro, flirte danca,  
en koloroj centnuanca,  
prujnmordite ventpelate  
ŝvebas ĉie: kampe, strate;  
jen kuniĝas, jen dissaltas,  
tie sinkas, tie haltas  
por susuri, sible plendi,  
jen funebre por silenti,  
poste supren, ek pro blovo,  
sed sencele kaj sen povo  
ĝis ĝi ĉesas kirle krozi  
kaj ariĝas por ripozi,  
kuŝi kiel morta garbo  
sub soleca seka arbo


Levelei őszi fának  
ezer színben táncot járnak,  
széltől űzve, dér csípetten  
utcán, mezőn még libegve;  
összetartva, majd elválva,  
hol süllyedve, hol megállva.  
Hol susogva panaszkodnak,  
majd gyászosan elhallgatnak,  
aztán fel egy széllökéssel,  
céltalanul és erőtlen  
örvénylésben kimerülve  
megpihennek összegyűlve,  
hanyatt, mint a halott kéve  
száraz, árva fa tövébe'.        (Tr. Sz.I.)

Profesoro **SZERDAHELYI István** (serdaheji) (naskiĝis la 20-an de aŭgusto 1924 en Negrești-Oaș, mortis la 21-an de aŭgusto 1987 en Budapeŝto) - hungara lingvosciencisto, esperantologo, vortaristo, juristo kaj pedagogo.



En 1965 li fondis kaj gvidis Esperantologian Fakkomisionon de Hungaria Esperanto-Asocio, kaj en 1966 fondis Esperanto-fakon ĉe Universitato ELTE kies lekcianto li estis ĝis sia morto. Ekde 1966 eblas fari ŝtatan lingvoekzamenon en Esperanto. Inter 1966 kaj 2011 en Budapeŝto funkciis la universitata fako Dum la 45 jaroj de funkciado 160 gestudentoj akiris diplomon de Esperanto-instruisto. Ĝi estis tiel nomata dua fako, oni ne povis rekte enskribiĝi al ĝi, la lernofakon oni povis alpreni nur en la dua jaro apud sian ĉeffakon.





# Orfo

**Antaŭe, mi vivis feliĉan vivon  
sed nuntempe pro la militoj  
Regas malsato  
De lundo ĝis sabato  
Mi vivas je helpopeto,  
Mi estas nun kiel besto  
Mi ĉiam ne ĝojas ĉar mi ne havas loĝejon,  
Mi frekventas nek lernejon  
Malĝojigas min ĉiam kiam aliaj infanoj iras lernejen.  
Mia vivo estas en malordo,  
Nevole mi ŝteladas nutraĵojn por pluvivi.  
Sed ni kompatindaj orfoj esperas je brila estontenco!**

**Poemo de Sabin Maruhe.**

# Paco

Kiam vi malaperas al milito, malsato aperas.

Ni ploras ĉiam, nia vivo malboniĝas.

Mankas laboro, kion fari?

Homoj en tiu ĉi lando mortas!

Ĉie fluas senkulpa sango!

PACO, kie vi estas?

PACO, kiam vi aperos en ĉi tiu lando?

Ni, kiuj loĝas ĉi tie en la oriento de Kongo , multe suferas.

Niaj koroj estas plenaj je vundoj!

Kion ni faru ?

Ni deziras PACON!

Ni ege sopiras al PACO!

Eĉ , se mallumo kovras ĉie, ĉiam en tiu ĉi lando.

Ni esperas , ke la paco regos iam en la mondo

Poemo de Sabin Maruhe





# Estu (ĉiam) militpaŭzo la 26-an de Julio!

La dato 26-a de Julio estas la naskiĝtago de Esperanto kies interna ideo estas la paca kaj egalrajta kunlaboro kaj kunvivado de la popoloj de la Tero.

Esperantistoj tradicie, jam la kvina generacio, festas tiun tagon en pli ol 120 landoj de la Tero kun sentoj homaranecaj. Kies gajno estus la batalhalto? Tio estus la gajno de tiuj homoj kiuj mortus tiun tagon, gajnontoj estus iliaj familioj, gajnontoj estus ĉiuj popoloj sur la Tero. Se oni povos haltigi la batalojn por unu tago probable oni povos haltigi ilin por unu alia posta tago eĉ tagoj donante al si mem tempon por pripensi ĉu daŭrigi ilin, la murdadon aŭ prefere ĉesi batali do venki superante sin mem ne super iu malamiko. Kvankam la ŝancoj por esti aŭdita kaj aŭskultita estas tre etaj - aŭ eĉ neniom - tamen por mi, kiel Esperantisto de pli ol kvindek jaroj restas neniu alternativo krom la supra alvoko.

**Mi dankas Vin pro via senlaca atento**

## ALDONOJ

**STRATEGIA LABORPLANADO – Ĉu resumebla? 127 Esperanto 1391(6) Junio 2024 - Duncan Charters**

**Niaj strategiaj kolonoj: KIRI**

**Letero de leganto - Letero al la redakitejo de la revuo Esperanto de UEA**

Karaj redaktantoj, mi skribas al vi, leginte la artikolon pri la labor-plano en la junia numero: “Strategia laborplano: ĉu resumebla?”.

**Renato Corsetti 1392(7-8) Julio-Aŭgusto 2024 Esperanto p. 155**

Literatura Aldono: Centvortaĵo Akuzativo -Tempovojaĝo (Belartaj Konkursoj)

Preleganto publike pardonpetas – Propono por la Rezolucio de la UK far S-no Ian Fantom

# **STRATEGIA LABORPLANADO – Ĉu resumebla? 127 Esperanto 1391(6) Junio 2024**

**Duncan Charters**

**VIZIO** Esperanto-komunumo kiu videble vivas en konkordo kun siaj idealoj kiel komunika modelo. Mondo de respekto al lingvaj rajtoj kaj diverseco de kulturoj, al kiu Esperanto kontribuas per agnoskata sukceso en antaŭenigo de interkompreniĝo celanta pacan progreson de la homaro.

**MISIO** Konsciigi la publikon kaj decidofarantojn pri la logiko kaj valoro de Esperanto kiel instrumento de edukado al kunlaborema mondo, celanta problemsolvadon per justa kaj efika komunikado.

**VALOROJ** Niaj valoroj spegulu la plej altajn universalajn aspirojn de la homaro: Amo, Vero, Justeco, Libereco, Unueco, Toleremo, Respondeco, Respekto al la vivo; kaj kunlaboradon kun ĉiuj progresemaĵoj, bonintencaj asocioj kaj individuoj strebantaj por tiujn apliki en homaj rilatoj.

# NIAJ STRATEGIAJ KOLONOJ – KIRI

## 1. KUNLABORADO Ni faciligu kunlaboradon inter esperantistoj per la jenaj rimedoj:

- Modernigita retejo por aŭtomatigi administrajn kaj financajn procedurojn, faciligi servojn al la membroj per provizo de necesaj kontaktoj, materialoj, mendiloj, aliĝiloj, membrecorenovigoj.
- Trijara Almanako reta kaj presita por kunigi ĉiujn necesajn informojn pri la Asocio, ĝiaj Landaj Asocioj kaj reprezentantoj, kunlaborantaj partneroj, agadraportoj, estontaj planoj.
- Trejni laŭbezone por pli efika laboro (konfliktsolvado, konsilejo: mediaciado? ombudsmano?).
- Doni pli da subteno al Landaj Asocioj kaj kuraĝigi al pli da interasocia kunagado.
- Krei komisionojn portempajn kaj longdaŭrajn por atingi difinitajn celojn.
- Atentigadi pri la neceso kunlaborigi malsamcelajn individuojn por realigi komunajn projektojn.

## 2. INFORMADO kaj komunikado

- Organizi sub la gvido de komisiito de UEA laborgrupojn kun grupestroj kaj membroj dediĉitaj al la antaŭenigo de la diversaj flankoj de informado: retejo [esperanto.net](http://esperanto.net); utiligo de eventoj kiel kongresoj por diskonigi Esperanton (gvidilo, trejnado); amaskomunikiloj (trejnado por kontaktoj kaj intervjuoj, preparo de materialoj); sociaj retoj (oportuneco de agado, komunikado); respondoj al kritikoj kaj misprezentoj (help-dokumentoj, reaga teamo); kontaktoj al opinigvidantoj (politikistoj, ĵurnalistoj, edukistoj); konstan ta fluo de bultenoj aŭ gazetaraj komunikoj kiuj celu eksterajn informfontojn, ne nur la internajn de UEA.
- Plifortigo de interna komunikado de UEA al membroj kaj partneraj asocioj.

### **3. RILATOJ kun la ekstera mondo**

- Daŭrigi subtenon de oficejoj kaj agado ĉe UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj.
- Subteni CED kaj ESF en la daŭra organizado de konferencoj, simpozioj, seminarioj kiuj helpas al niaj partneroj atentigi pri lingvaj rajtoj, lingva diskriminacio, solvoj por komunikaj problemoj.
- Kuraĝigi esperantistojn al aktiva engaĝiĝo kun lokaj asocioj havantaj mondan perspektivon.
- Organizigi kaj preparigi por peti agnoskon de Esperanto (Esperanto-tago, asembleoj de UN, Unesko, kaj iliaj neregistaraj organizaĵoj [NROj], parlamentoj).
- Diskonigi kaj kuraĝigi al partopreno esperantistajn kaj interesantajn esploristojn en konferencoj, eldonprojektoj.
- Proponi al aliaj asocioj servojn kiujn ni kapablas liveri per niaj transnaciaj kontaktoj.

### **4. INSTRUADO**

- Kunlabori kun ILEI por helpiri ealigi ĝiajn celojn rilate instruadon de Esperanto en la lernejoj.
- Subteni la laboron de edukado. net kaj la KER-ekzamenoj por kvalifiki instruistojn.
- Kuraĝigi al subvencipetado por helpi lernejojn kaj edukajn instancojn atingi siajn celojn uzante Esperanton kiel instrumenton por transnacia interkompreniĝo.
- Subteni projektojn kiel la 30 Oraj Horoj kaj la Multlingva Akcelilo por progresi al organizitaj internaciaj eksperimentoj pri la valoro de Esperanto kiel eduka instrumento, faciliganta lingvolernadon kaj transkulturan interkomprenon inter samaĝaj lernejoj.

## **Letero de leganto Letero al la redakto de la revuo Esperanto de UEA**

Karaj redaktantoj, mi skribas al vi, leginte la artikolon pri la labor-plano en la junia numero: “Strategia laborplano: ĉu resumebla?”.

**Renato Corsetti** 1392(7-8) Julio-Aŭgusto 2024 Esperanto p. 155.

Unue mi danku la Prezidanton kaj la tutan Estraron pro la laboro resumi ideojn esprimatajn tra la jaroj. Ĝenerale mi diras, ke ĝi estas aprobebla, kvankam iom ĝi odoras je troa atento al la nuntempaj komunumo kaj organizaĵo.

Nun iom pli detale pri la unuopaj partoj:

- **Vizio:** mi movus la unuajn tri liniojn al la dua loko sub “Mondo de respekto al lingvaj rajtoj...homaro” aŭ eĉ entute forigus ĝin, ĉar ĝi jam estas menciita kiel kontribuanto al tiu mondo de respekto de homaj rajtoj.
  - **Misio:** Perfekta frazo, laŭ mi. Mi ŝategas ĝin.
  - **Valoroj:** Bela frazo, certe uzebla por priskribi nin al neesperantistoj. En ĉi tiu kunteksto, ĝi estas simpla kuraĝigo al la soldatoj.
  - **Novaj strategiaj kolonoj** – KIRI: Mi mem estas tro maljuna kaj mi memoras la tempojn de mia juneco, la tempojn de **Ivo Lapenna** en kiu la laborplano konsistis el **nur tri vortoj: Informado, Instruado, Utiligado**, kiujn ĉiuj komprenis eĉ sen klarigoj kaj aplikis aŭ ne aplikis laŭ sia personeco. Sed ni ne donu gravecon al tre flanka afero.
- Persone mi uzus IRIK por doni la ĝustajn prioritatojn.**



□ **1. KUNLABORADO:** Ĉi tie ni jam komencas detali kaj mi vidas danĝeron en promesado de io, kiel granda moderna retejo, kiun ni [estaroj kaj komitatanoj] ne sukcesis realigi de 2013. Ĉu ni havos la ĝustajn estraranojn por realigi ĝin ene de akceptebla periodo [ni diru: du jaroj]? Mi restus iom pli prudenta kaj preferus zorgi pri akirado de nova estraro, kiu konsciis, ke UEA iam estis aŭ provis esti la centro de la movado, kaj deziru, ke ĝi restu tia. Por fari tion la estraro devos ĉirkaŭrigardi kaj ame taksi la laborantojn en la landoj kaj en la fakoj, daŭre rilati kun ili kaj servi al ili kaj informi la publikon pri ilia mirindeco. Nur tiel poste sekvos la adresaroj de la landoj kaj de la fakoj kaj la eblo povi informi la publikon, pri la plej absurdaj demandoj, ekzemple kiun oni kontaktu, por konvertiĝi al ŭonbulismo.

Unu punkto en tiu sekcio, kiun mi aparte ŝatas estas: “Krei komisionojn portempajn kaj longdaŭrajn por atingi difinitajn celojn.” Unu afero, kiun UEA antaŭe havis, kaj kiu laŭgrade estis forgesita, estis iu grupo de kunlaborantoj de la estraranoj, relative multenombra, ĉar la estraranoj ne povas fari ĉion, kion ili devas fari, kaj ili devas gvidi komisionojn de kunlaborantoj prefere al oficistoj, kiujn cetere ni ne povas pagi.

□ **2. INFORMADO** kaj komunikado: Mi ne havas ion por diri, krom konsili al la estrarano pri informado trovi almenaŭ 10 aŭ 20 helpantojn, ĉar la laboro farenda, por plenumi la mision, estas giganta. Memoru, ke tradicie la komitatanoj kunlaboris kun la estraranoj. Estas facile decidi kaj ne labori kaj cetere la nuna komitato nek decidas nek laboras por la asocio.

□ **3. RILATOJ** kun la ekstera mondo: Kiel numero 2.

□ **4. INSTRUADO:** Perfekta punkto laŭ mi.

Akuzativo – tempovojaĝo en vicordo kiel ĉio estos okazinta

Oni finfine lernis Esperanton por ŝpari tempon kaj monon. La gajnitan tempon oni ekuzis por akiri realajn sciojn kaj kapablojn.

Artefarita inteligento tradukis ĉiun anglan tekston Esperanten. Kie la teknika lingvaĝo ankoraŭ mankis, ĝi kreis ĝin.

La "ĉiopova merkato" pluevoluigis la Esperantan ekonomion.

Oni al kutimiĝis rezigni pri transdono de gepatraj lingvoj al posteuloj kaj ekkonstatis, ke ekzistas unu Dio sole.

Oni decidis denove konstrui Babelan Turon. La nuboj estis jam trapikitaj kiam la homoj ekbatalante ĉesis konstrui pro kakofonio de lingvoj, je ĉies miro, ne komprenante la paroladon unu de la alia.

Esperanto-Akademio forigis la akuzativon semajnon pli frue.

*"La kongreso alvokas al ĉiuj edukaj instancoj en Afriko konsideri la inkluzivon de Esperanto kiel studobjekto, cele al provizo de gente neŭtrala facile lernebla kaj uzebla dua lingvo por internacia komunikado. La kongreso ankaŭ atentigas, ke lerno de Esperanto povas provizi bazon por ĝenerala lingvokonsciigo kaj posta lernado de aliaj lingvoj."*

Propono de Samideano Ian Fantom por inkluzivigi ĝin en la Rezolucio de la Kongreso – alveninta dum la kunsido de la Komitato.

Bedaŭrinde mi ne povis sciigi la komitatanojn pri tio nek laŭtigi ĉi gravan opinion kaj nun mi publike pardonpetas de la Proponinto. Mi nun kundividas konsentinte la Proponon.

La kialo estis ke mi mem fiaskis bone alparoli al la Strategia Laborplano kaj efike direkti la atenton al gravaj laŭ mi vidpunktoj – tamen mi esperas ke tiuj vidpunktoj estos konsiderataj dum la realigo de la Laborplano.